

Pri la infanlibro KUMEŬAŬA la filo de la ĝangalo de Tibor Sekelj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 573/89-2, 1982 aprilo 08 kaj 10.
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-89/SRI-1982-89-2-573-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-infanlibro-KUMEUAUA-la-filo-de-la-ghangalo-de-Tibor-Sekelj.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉiu scias, ke se la originala beletra literaturo en esperanto estas sufiĉe malriĉa kaj malabunda, la porinfana literaturo ankoraŭ pli malriĉas. Tial la apero de ĉiu nova titolo en tiu ĉi ĝenro estas vera evento.

A.- La eldonejo TK-Stafeto aperigis antaŭ du jaroj sufiĉe belaspektan libron de Tibor Sekelj, kies titolo estas KUMEŬAŬA LA FILO DE LA ĜANGALO. Ne nur la tekston faris la en esperantujo fama esploristo pri Amazonio, sed ankaŭ la bildojn.

Cl.- Okaze de veturo per trajno mi komencis legi tiun ĉi infanlibron kaj mi devas diri, ke mi havis multe da plezuro, kaj ke mi eĉ preskaŭ maltrafis komunikon, ĉar mi tute forgesis atenti pri la ĉirkaŭaj eventoj. Tio ĉi ĉiam estas bona punkto por literaturaĵo.

A.- Mi havis la okazon poste ekutiligi tiun ĉi libron en kurso por esperanto-komencantoj, kiuj deziras lertiĝi en la legado kaj konversacia arto en esperanto. Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo montriĝas hona legolibro por tiu ĉi publiko pro pluraj kialoj, la agrabla rakontmaniero de Tibor Sekelj, la temo mem de la vivo en Amazonio, la simpleco de la frazoj, kie la vortaro tamen estas tre riĉa kaj preciza, kaj la litertipo tre granda, kiu taŭgas ne nur por la infanoj, sed ankaŭ por la instruado.

Cl.- Ni do rekomendas tiun ĉi libron por la du publikoj, infanoj flue parolantaj esperanton kaj plenkreskuloj, kiuj lernas esperanton.

A.- Por ke vi ricevu impreson pri tiu ĉi libro ni hodiaŭ legos al vi la komencon de tiu ĉi aventurplena romano. Jen ni ekcitas:

Cl.- "-Jaguar!... Jaguar!

A.- Tiu ĉi krio aŭdiĝis plurfoje el la buŝo de miaj kunvojaĝantoj, dum kelkaj el ili staris apogante sin sur la ferdekbarelojn de nia ŝipeto, kaj aliaj kurante supreniris la ŝtuparon por eliri sur la ferdekon.

Cl.- Ankaŭ mi estis altirita de la krioj kaj alveninte sur la ferdekon, mi vidis nekutiman scenon.

A.- Meze de la kreskinta rivero dravis insuleto en la direkton kontraŭan al nia navigado, portata de la forta akvo fluo.

Cl.- Nia rivero, Aragvaĵo, alfluanto de Amazono, en Suda Ameriko, estas kaprica rivero. Ofte sur ĝi okazas, ke la forta fluo deŝiras kaj kunportas pecon de la riverbordo, kune kun la arboj kaj bestoj, kiuj sur ĝi troviĝas.

A.- La fingroj de la pasaĝeroj montradis en la direkton de la flosanta insuleto. Ili estis tre ekscititaj. Sekvante per la rigardo iliajn montrofingrojn, mi malkovris la kaŭzon de ilia ekscitiĝo.

C1.- Antaŭ unu el la arbustoj, sur la insuleto, staris jaguaro, la plej granda kaj plej danĝera sovaĝbesto de la sudamerikaj ĝangaloj.

A.- Jam plurfoje mi estis vidinta jaguaron en la praarbaro. Ĉiam ĝi aspektis majesta, elasta, preta al atako. Sed tiu ĉi jaguaro havis nenion el sia kutima memkonscia konduto. Ĝia flava felo kun nigraj makuloj, malseka kaj malpura, donis al ĝi aspekton de malsekiĝinta kato. Senespere ĝi premis sin al arbo. Ĝi rigardis nin per humila rigardo, almozpetante ies helpon. Sed ni ne povis helpi al ĝi.

Cl.- Kaj dum ni kun kompato ĝin rigardis, la "reĝo de la ĝangalo" drivis laŭ la rapida fluo de la akvo, atendante ke la insuleto disfalu, kaj ke ĝi mem dronu inter la ondoj, se ĝi ne sukcesas ĝustatempe savi sin naĝante al la riverbordo.

A.- Jam ni estis perdintaj el la vido la insuleton, sed ankoraŭ ni staris sur la ferdeko, kiam nia ŝipeto ricevis tiel fortan "baton, ke ĝi terure ekskuiĝis. Kelkaj pasaĝeroj eksanceliĝis, aliaj eĉ falis sur la plankon.

Cl.- La ŝipo haltis, kaj fortega knarado ekaŭdiĝis el ĝia interno. Konfuza kriado ekestis. La pasaĝeroj panike puŝadis unu la alian iuj volis kuri dekstren, aliaj maldekstren, iuj supreniri la ŝtuparon, aliaj descendi.

A.- Subite iu ekkriis:

Cl.- Ni subakviĝas!

A.- Fakte, tiuj, kiuj staris sur la ferdeko, sentis ke la akvo jam atingas iliajn piedojn. La paniko pligrandiĝis. Ĉiuflanke aŭdiĝis plorado de virinoj kaj de infanoj. Tiam aperis la ŝipestro. Lia voĉo plifortigita per laŭtparola funelo, klopodis superkrii la aliajn:

Cl.- Pasaĝeroj, pasaĝeroj! Ne puŝu la aliajn. Nenia danĝero ekzistas. Ni havas savboaton, Kaj unu post la alia vi estos transportitaj al la riverbordo. Trankviliĝu! Ne krii kaj ne interpuŝiĝu!

A.- Parte pro la vortoj de la ŝipestro, parte ĉar ni vidis kiel du ŝipanoj mallevas la savboaton, ni iom trankviliĝis. Kvar patrinoj kune kun siaj infanoj estis la unuaj transportataj al la riverbordo. Poste la du ŝipanoj revenigis la boaton, kaj aliaj virinoj eksidis en ĝi. Tiam alvenis la vico de la viroj. Entute ni estis ĉirkaŭ tridek personoj sur la ŝipeto, kaj nia evakuado daŭris preskaŭ tutan horon. Dum ni senpacience atendis nian vicon, la akvo sur la ferdeko fariĝis pli kaj pli profunda. Nur kiam la lasta el ni atingis la riverbordon, la ŝipestro kaj la aliaj ŝipanoj forlasis la ŝipeton.

Cl.- Ni staris sur la riverbordo ĉirkaŭitaj de vera praarbaro. La arboj kaj arbustoj estis interplektitaj per lianoj, tiuj longaj kaj kiel ŝnuro flekseblaj pendantaj radikoj.

A.- Antaŭ ni, meze de la larĝa, flava rivero elstaris la pruo de nia ŝipeto. Ni eksciis ke la kauzo de la ŝiprompiĝo estis subakva trunko, kiu truigis la kirason de nia veturilo.

Cl.- Sed nun tiu sama trunko subtenis la ŝipon ne permesante al ĝi alfundiĝi."

A.- Fino de la citaĵo.

Cl.- La libro KUMEŬAŬA, LA FILO DE LA ĜANGALO rakontas, ke dank' al la helpo de indiana infano la pasaĝeroj de la vundita ŝipo povis elturniĝi kaj fine forlasi sian improvizitan restadejon.

A.- Nia citado de la komenco de tiu romano de Tibor Sekelj rimarkigis al vi tre verŝajne, ke eĉ se la priskriboj estas sufiĉe originalaj, la vortaro restas ege simpla. La aŭtoro ne timas ripeti la vortojn pro stilaj tabuoj. Kaj tial la libro estas tre taŭga infanlibro kaj agrabla legaĵo por esperanto-komencantoj. Des pli, ke tre rapide evoluas la situacioj. kaj oni samtempe multon lernas pri la vivo en la amazonia praarbaro. La aŭtoro rakontas pri propraj spertoj kaj observaĵoj.

Cl.- Ni nur povas kuraĝigi vin aĉeti kaj eklegi aŭ eklegigi la infanromanon KUMEŬAŬA, LA FILO DE LA ĜANGALO.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo!

(muziko - kantas: Olivier Tzaut)

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014